

REDAKTORA VORTO



★

„Esperantujo, amata tero,
naive kredas mi,
ke estas vi en vero“ – kantis
esperantistino Dina.
Ni provu ne konsenti kun ŝi.
Ja PIV eksplikas – Esperantujo estas
la lando de esperantistoj, provizore
ekzistanta en iliaj kongresoj.
Ni aldonu ankaŭ en E-renkontiĝoj,
E-aranĝoj. Tio ja estas manifestiĝaj
formoj de Esperantujo.
Ne tiom gravas, ke la aranĝoj kutime
okupas iun determinitan teritorion.
Gravas la medio, la etoso kiu regas
sur tiu ĉi areo.
Se vi partoprenas E-aranĝon por
komunikiĝi kaj amikiĝi kun
alinacianoj per Esperanto,
vi malkovras Esperantujon.
Kaj se venis nur por aŭskulti ies
prelegon – vi estas povra
ĉeestanto de E-aranĝo
sen sperti la animon de Esperantujo.
Esperanto fariĝis la lingvo
de interkomunikado por multaj
diverstradiciaj, diverskulturaj homoj.
Esperantujo servas tion!
La fenomeno de Esperantujo estas
universala, ĉiam pli disvastiĝanta,
ne forpasanta.
Bonvenon al Esperantujo!

★

Vytautas Šilas /*Vi:taŭtas Ŝilas*

LITOVA STELO

Lietuvos žvaigždė

N-ro 4 (194)

julio - aŭgusto 2010, XX jaro

ENHAVO

- 2** Kio estis la aranĝo BET ?
9 Superba drameska soprano
N. KAZLAUSKAITĖ
- KAZLAUS
14 Ĵurnalista konkurso de *LS*
15 Jubileas brava muzikisto
A. PIŠČIKAS
17 Elstara Esperantisto
A. DAMBRAUSKAS-
DOMBROVSKI
18 *pri li* – B. GOLDEN
21 *pri li* – M. CASANOVES
25 Forpasis s-no V. BANIULAITIS
26 Dankon al “Gariŭnai”
27 Eterne progresanta
A. GRINCEVIČIUS
28 Ĵurnalistoj bierumas
29 MUZO-10 okazis
30 E-mozaiko
31 Ridetu kune
32 Abono al *Litova stelo*

La fotoj sur la kovrilaj paĝoj –

sur la 1a – de Vaidotas GRIGAS

sur la 2a – de Elena PIŠČIKIENĖ

sur la 3a – de Gran teatre del Liceu,

Barcelona

sur la 4a – de Joanna FILIPOVICZ –

CHOROSZUCHA

BET-2010

INTERKOMUNIKA KAJ KLERIGA ARANĜO

La 27an de junio 2010, rande de la orientnorda urbo *Visaginas*, en la urba Profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado okazis solena inaŭguro de la **46-aj Baltiaj Esperanto tagoj**. La 3-an de julio pasis ties fermo. Kio estis BET? Stranga estas la demando, ĉu ne? Oni diras – ĝi estas aranĝo. Aranĝoj ekzistas diversaj. Kiu, se pli precize? BET, precipe la litovaj BET-oj, laŭ sia programo imitas Universalajn kongresojn. Ĉu BET estas kongreso, almenaŭ kongreseto? La vicprezidanto de UEA Claude **Nourmont**, partopreninta nian BET-on, diris kategorie: ”Ne, BET ne estas kongreso!”.



La urba Blazono – Argenta gruo


Povas esti, ke aliaj partoprenintoj de BET havas aliajn respondojn. Elekto inter diversaj aranĝoj ja estas granda: lingvofoiro, seminario, konferenco, festo, festivalo, universitato, praktikejo, tendaro, somerumado k. t. p. La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller en sia gratula mesaĝo al BETanoj imagis BET-on fenomeno (eksterordinara ?), aranĝo kun eduka valoro. Ĉu BET estas edukejo? Kio finfine estas BET? Respondi la demandon povos finlege ankaŭ la legantoj.



Kio estas BET – al ĵurnalisto de Litova radio kaj televido provas espliki P. Jegorovas

LINGVA LERNEJO KAJ SOMERA UNIVERSITATO

En la programo de BET estis E-kursoj (komencaj kaj konversacia), konatiga kurso pri la litova lingvo kaj litova kulturo (prelegis Petras **Ĉeliauskas**), vesperumoj, ekskursoj kaj Somera Universitato. Dominis Somera Universitato kun pli ol 20 prele-joj. Prelegis 13 lektoroj. Eĉ po kvar prelegojn legis Mikaelo **Bronštejn** kaj la duopo Peter **Balož** kun Jevgenij **Gaus**.



Peter Balož kun Jevgenij Gaus

La plej grandan intereson elvokis la didaktaj prelegoj de la retuma duopo Peter kaj Jevgenij pri komputumaj temoj. Same la historiaj prelegoj de Aleksander **Korjenkov** “L.L. Zamenhof en Grodno” kaj de M. Bronštejn “Zamenhof kaj Postnikov”. Ĝenerale, la lekcionoj estis bone vizitataj – la aŭditorioj ĉiam estis plenplenaj. Rektoris la Someran Universitaton estrarano de Litova Esperanto-Asocio doktoro pri teknikaj sciencoj do-cento Arimantas **Raĉkauskas**



Parto da aŭskultantoj en Somera Universitato

Ŝajnus, ke al BET ĉiuj venis por eniri la movadon, por praktiki, por maksimume utiligi Esperanton. Tamen, kiel ĉiujare, venis ankaŭ eternaj komencantoj – tiuj, kiuj de jaro al jaro ne progresas pri la lingvo. Tiujn oni admonis – krokodilu mallaŭte!

Ĉiumatene (krom merkredo, la ekskursata tago) okazis lecionoj en ĉiunivelaj E-kursoj. La komencantojn instruis litova instruista teamo Stanislova **Adomaskienė**, Stanislava **Sobanska** kaj, kiel ĉiam, Gražina **Opulskienė**. Dum kelkaj tagoj instruis ankaŭ Stano **Marček** (li ankaŭ prelegis pri metodiko de kursgvidado). Konversacian kurson por progresantoj gvidis Svetlana **Smetanina**.

EKSKURSOJ

La 30a de junio (merkredo), same kiel dum UK-oj, estis ekskursita tago. Pli ol 45 BETanoj partoprenis la busan ekskurson tra superba nacia parko “Aukštaitija” (poloj aparte ekskursis aŭte por vidi vidindaĵojn de norda Litovio). La busanoj unue vizitis muzeon pri abelbredado en *Stripeikiai*. Tie estas prezentitaj multaj specoj da abelujoj de la plej malnovaj ĝis nunaj – modernaj. Unu funkcia abelujo estis en ligna skulptaĵo de *Bubilas* (antikva litova abela kaj miela dio). Kelkaj esperantistoj aĉetis produktojn de abeloj – ĉefe mielon, peĉon kaj polenon.

Postis aŭtenta rivera muelejo ĉe la vilaĝo *Ginučiai* kaj turisma centro *Palūšė* kun preĝejo, konstruita en la jaro 1570 nur pere de hakilo kaj segilo kaj eĉ sen unu najlo. Sekvis banado ĉe cignoj en apuda lago *Lūšiai*. Revenvoje al Visaginas oni vizitis kafejon-muzeon „Romnesa“ en la vilaĝo *Strigailiškiai*, kie estas produktataj, eksponataj kaj vendataj tradiciaj litovaj branĉkukoj litove nomataj „šakotis“.

Vendrede kelkaj grupoj de esperantistoj ekskursis al la proksima fermita nuklea centralo. Verdire, la centralo povis funkcii ankoraŭ dum 10-15 jaroj, sed EU starigis la eniran kondiĉon por akcepto de Litovio – fermi la centralon jam ĝis la jaro 2010. La centralo estis definitive fermita la 31an de decembro 2009 kaj tie nun okazas dismontaj laboroj (grandan parton de bezonata elektro produktas modernigita hejtelektrejo, plian elektron Litovio aĉetas ĉe Rusio).

EKSPROMTAĴOJ

Ne ĉiuj antaŭviditaj distraj programeroj de BET okazis. Neatendite mortis eksprezidento de Litovio M. Brazauskas kaj estis deklarita tritaga funebro. Dum unu el la vesperoj V. Šilas okazigis diskutadon pri problemoj en Esperantujo. Alian vesperon lerte “savis” Mikaelo Bronštejn. Anstataŭ antaŭvidita koncerto li proponis kvizon kaj oni interese pasigis la vesperon. Komence Mikaelo rakontis pri iam populara en Rusio televida ludo kiu nomiĝas “Kio? Kie? Kiam?” Poste sekvis liaj demandoj kaj tiu, kiu opiniis scii la respondon devis levi la manon kaj diri ĝin. Se la respondo ne estis taŭga tiam alia homo povis respondi. Tiu, kiu prezentis plej multe da trafaj respondoj ricevis ĉefan premion. La demandoj estis diversaj: pri Esperanto kaj Zamenhof, pri historio, pri religio, pri literaturo, eĉ pri diamantoj.

En kadro de BET okazis kunveno de TEĴA kaj arta konkurso MUZO. La anoncita arta konkurso “MUZO” ne okazis en antaŭplanita maniero (pri ĝi – vidu la paĝon 29).

La libervola organizaĵo – Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio havas 110 membrojn en 38 landoj. Partoprenis en BET dek, sed en tiea ĵurnalista kunveno, nur 6 el ili. Sekve, pritrakto de internaj, teknikaj aferoj de TEĴA estis superflua.

Ĝenerala sekretario de TEĴA Vytautas Šilas (Litovio, Vilno) prezentis historion de TEĴA, kiu komenciĝis jam en 1946 kaj kiu havis eĉ kvin reorganizaĵojn. La lasta komenciĝis dum la Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj-esperantistoj en Vilno (2008) kaj finiĝis en 2009 dum UK en Roterdamo. La organizaĵo kiel jura persono estas registrita en Vilno (2009). Laŭ la statuto ĝi rajtas kaj povas agi en tre multaj sferoj.



Prelego pri SEJM – Mikaelo Bronštejn



Pri verkisto H.Sudermann – Halina Gorecka



Ekskursi al Nacia parko !



Eksterprograma vespera bierumado



Astronomia vespero apud la lago Visaginas. BET momente eksimilis al SEJT!

Pri eblaj ontaj aktivecoj de TEĴA parolis redaktoro de la revuo „Esperanto“ Stano Marček, vicprezidanto de UEA Claude Normont, unu el la gvidantoj de la fama retejo E@J Peter Balaž, latva aktivulo Aivars **Kalninš**, litova pedagogo Algimantas **Piliponis**. La resuma konkludo estis: aktiva TEĴA povus multe kontribui la komunan aspiron pri diskonigo de Esperanto. Por informiĝi pri TEĴA venis 19 BET-anoj. Sekve pri ĵurnalista agado interesiĝas sufiĉe multaj.

LA ARĜENTA GRUO

Redakcia retadreso: vilisidl@yahoo.com

ĈIUTAGA INFORMILO DE BET-46 N-ro

La arĝenta grupo estas emblemo de la urbo Visaginas. “**La arĝenta grupo**” estis la titolo de ĉiutaga informilo redaktata de d-ro Vilius **Šidlauskas** (vilisidl@yahoo.com), estrarano de Litova E-asocio (vidu la foton). La kvarpaĝa ilustrita informilo (kun koloraj fotoj!) venadis el presejo diligente ĉiumatene dum la matenmanĝa horo. Ĝi prezentis gratulvorton de la Alta reprezentanto de la 46aj Baltiaj E-tagoj la urbestro de Visaginas Vytautas **Račkauskas**, publikigis mesaĝojn de Probal **Dasgupta**, prezidanto de UEA kaj de Osmo **Buller**, Ĝenerala direktoro de UEA. En ĉiu numero de “La arĝenta grupo” aperadis aktuala precizigita tagordo de BET, raportetoj kaj impresajoj de BETanoj pri okazintaj aranĝoj. Ilustre el la informilo ni represas verkaĵeton de D. Manionienė kaj A. Plerpienė “Taga anekdoto”:



“Tri komencantinoj el la litova urbo *Panevėžys* ekvidis en la programo de BET-46 informon pri kunveno de TEĴA kaj ne sciante signifon de tiu mallongigo kaj ne rimarkinte supersignon sur la litero “J” ili legis la vorton TEĴA kiel “teja” kaj supozis, ke okazos kunveno ĉe teo. Ili plibeliĝis, prenis iomete da dolĉaĵoj kaj elrapidis en la kunvenon. En la salono ili ekvidis lektoron Vytautas Šilas ĉe komputilo kaj seriozvizaĝajn aŭskultantojn...

Dum mallonga tempo la komencantinoj komprenis, ke ĉi tie okazas kunveno de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Do, iliaj sukeraĵoj kaj dolĉaĵoj restis en iliaj sakoj... “Aperis entute sep numeroj de la ĉiutaga informilo “La arĝenta grupo”.

Ili ĉiuj estas elŝuteblaj ĉe retejo de Litova E-asocio www.esperanto.lt

DANKOJ KAJ OPINIOJ

La aranĝon BET-46 partoprenis 150 esperantistoj el 18 landoj (tamen ankoraŭ preskaŭ 30 aliĝintoj ne venis kaj ne povis ĝui la aranĝon). Neniu kontestos, ke ĝi sukcesis. Pro tio, ke ĝi estis tia, ne alia, la unuajn gravajn dankojn meritis la alta protektanto de la urbo Visaginas **Vytautas Račkauskas**, la ĉefa kunordiganto **Povilas Jegorovas**, prezidanto de Litova E-asocio kaj la prezidanto de la loka E-klubo “Espero” **Edvardas Pisčikas**, gvidanto de la fama muzika trupo “Asorti”. La urbestro akceptis kaj regalis difinitan nombron de BETanoj. Iuj persone, ceteraj aklande dankis lin pro la subteno. Ĉe la fermo P. Jegorovas pridankis multajn esperantistojn – membrojn de la Organiza komitato, aktivajn partoprenantojn – entute pli ol 30 personojn.

Nederlandano **Van Den Hoek Luk**: “Mi havas bonan opinion pri BET. Tre bela loko, bona programo. Pleje min impresis la malfermo. Mi rekomendos al miaj samklubanoj veni al estontaj BET”.

Svedo **Holmlund Leif**: “Mi persone partoprenis jam du BET-ojn. Ili similas idee. Interesaj estis ekskursoj kaj vesperaj programoj. Mi invitus svedojn partopreni BET-ojn.”

Francino **Nourmont Claude**: “Mi dankas la organizantojn de BET-46, ke ili sukcesis daŭrigi la tradicion. Mi esperas, ke latvoj faros same bonan BET kaj ke mi povos tien veni.”

Rumano **Tudorache Emil**: “Litovio plaĉis al mi. Antaŭ la BET mi estis en Kaŭnas, poste por du tagoj mi iros al Klaipėda. Ĝenerala rimarko al organizantoj – pri viaj aranĝoj vi devas informi sufiĉe frue kaj sufiĉe detale. Vi konsideru tion, ke ne ĉiuj esperantistoj posedas komputilon kaj estas konataj kun ĝi.”



Rusino **Svetlana Smetanina**: “Mi longe ne partoprenis BET-ojn kaj mi tre ĝojas, ke mi venis ĉi tien. Al mi tre plaĉis organizado, la loko, la partoprenantaro kaj la programo. El mia lando multaj dezirus veni al BET. Tamen frontas la viza problemoj!”

FOTA GALERIO

Vi foliumas fotojn pri iu E-aranĝo kaj “rememoroj aperas pri la tagoj pasintaj”. La okazon por refreŝigi memoron prezentas bonega fotisto el Belgio Mikaelo Cwik (Michael@Cwik-online.net). Li jam iom ordigis siajn fotomemoraĵojn kaj proponas 201 bildojn de BET-46 en Visaginas, kiuj prezentigās post la kliko al sekva adreso: <http://gallery.me.com/cwikbe#100252>. Aŭ en pli kvalita prezento <http://gallery.me.com/cwikbe#100236&bgcolor=black&view=grid>
Sube ni prezentas kelkajn liajn fotojn el la galerio.



Klarigoj: 1. Ligna preĝejo en Palūšė. 2. La sanktan meson en E-to faras s-no L.Vaičiulionis. 3. La urbestro V.Račkauskas (kun floroj) akceptis esperantistojn. 4. En akceptejo de BET-46

Ĉiuj ĝis nun alireblaj fotoj pri la BET-46 en Visaginas estas akumulitaj en retgazeto "Barelo" (<http://barelo.blogspot.com/>). Tie sub la rubriko *Fotoj* maldekstre de komputila ekrano estas lokitaj eĉ kvin blokoj da fotoj (de Joanna Filipowicz, de Mikaelo Bronŝtejn, de Paŭlo Branko, de Michael Cwik ankaŭ de ruslingva retejo en Visaginas). Poste tie aperos ankaŭ pliaj fotoj. En "Barelo" estas trovebla ankaŭ ĝeneraliga artikolo pri BET-46.

Vytautas Šilas – la redaktoro de “LS”,
la fotoj de Joanna Choroszuca kaj de V.Šilas

LA SUPERBA SOPRANO NOMEDA KAZLAUS

*La superba drameska soprano litovino **Nomeda Kazlauskaitė** – **Kazlaus** /Kazlaŭskajte lernis en prestiĝa Vilna Ĉiurlionis-noma artlernejo, studis en Litova Muzika kaj Teatra akademio (1992-2001). Ŝi estas laŭreato de vokalistaj konkursoj en Aŭstrio, Ĉekio, Slovakio, Latvio, Rusio.*

*Ekde 2000 Nomeda Kazlaus kantas kun la legendo de XX j. **Montserrat Caballé**. Pri la voĉo de Nomeda raviĝas aŭskultantoj de la plej famaj Eŭropaj teatraj kaj koncertaj salonoj. Ŝia repertuaro estas vasta – ekde italaj klasikaj ĝis nuntempaj verkoj de XX j. (eniras ankaŭ verkoj de litovaj aŭtoroj). Kvankam la operaj kulturfontoj – Italio kaj Hispanio estas nur la dua ŝia hejmo (plejparte ŝi loĝas en Vilno), ŝia mirinda soprano*



*en Litovio estas aŭdata ne tre ofte. Eble pro tio, ke dum ĉiuj jarcentoj litovoj senavare distribuis al tuta mondo siajn talentulojn. Litova Stelo do ĝojas finfine ĝisatendinta viziton de ĉi tiu mondominanta Stelo sur la paĝoj de la revuo. Sonorvoĉan **Nomeda Kazlauskaitė** – **Kazlaus** paroligas ĵurnalisto **Audrys Antanaitis**.*


Mi dezirus komenci ekde komenco, kiam Vi estis ankoraŭ malgranda knabineto. Kiel komenciĝis Via vojo al muziko?

Nomeda Kazlaus: Naskiĝis mi en Vilno, tie, kie mi ankaŭ nun loĝas. Mi kuradis laŭ stratoj de la malnova urbo. Ankaŭ sur la Katedrala placo kie, dispelante kolombojn, mi “demonstris” mian voĉon. Muzika edukistino de la infanĝardeno klare direktis miajn gepatrojn – ĉi tiun knabinon nesesas venigi al Ĉiurlionis-noma artlernejo. Mia avo posedis precipe belan drameskan tenoron – sen li povis okazi neniu vilaĝa nupto aŭ sepulto. Do, konserviĝis surbendigoj, kie ni kantis duete! En unu el ili li demandis: “Kio, etulin, vi dezirus esti?”. Mi respondis: “Aveto, mi deziras esti kantistino”. “Tiam, per kia voĉo vi kantos?” Kaj mi respondis: “Per granda voĉo!” Tiam mi estis trijara. En la Artlernejo laboris bonegaj pedagogoj. Ili laboris ankaŭ individue, kun

ĉiu persone, malkovris kapablojn de gelernantoj. Kvankam mi estis lerneja pianistino, tamen mi tutan tempon murmure kantetis, porekzemple, verkojn de Bach. Kiam mi frekventis la 7an aŭ 8an klason, miajn manojn trafis sondisko de Marija Callas. Mi neniam forgesos kiel min tiam obsedis ŝia voĉoforto, ŝia talento. Ŝia voĉo kaj la muziko skuis min kaj mi ploregis kaj travivis la tutan dramon kvankam mi vere la tekston ne komprenis. Estis “La destino” (La forto de Ĝ destino) kaj la rolo, kiun nun mi kantas. La lingvo de la muziko estas tiom granda potenco, kiu junan homon vekas, aktivigas kaj mi envere komprenis – mi deziras kanti!

La muziko Vin prisorĉis. Sed ĉu la vojo al la profesia kantado estis malfacila? Ĉu Vi kun Via voĉo estis rimarkita, ĉu Vi devis ie batali por Vi? Ja onidire la vojo de artisto estas per dornoj kovrita?

Nomeda Kazlaus: Dornoj certe estis kaj estos. La artista vojo neniam estas facila. Necesas multa laboro kaj sukcesigaj cirkonstancoj. Post la studentiĝo en Muzika Akademio mi dum du jaroj studis muzikologion. Fakultative mi vizitadis operan kantarton kaj strebis transiri al studado de la kantarto. La rektoro Juozas Antanavičius tiam duope kun la estro de la kantoarta katedro Vladimiras Prudnikovas pridiskutis kion ili faru kun tia studentino. Ili proponis resti en muzikologio kaj operan kantarton plustudi fakultative. Mi diris: “ne, ne!”. Mi forlasis muzikologion. Tiel mi elektis mian vojon. Post mia transiro al la katedro de opera kantado venis al Litovio direktoro de Zurika teatro Alexander Pereira. Li estis komisiita elekti junan plenumanton por stipendio de kampanjo „Kraft Jacobs Suchard“. Dum la elektadado alestis gestudentoj de superaj studkursoj kaj mi, ĵus akceptita. Pereira traaŭskultis min kaj diris al la rektoro – la stipendion mi atribuas al la juna Nomeda. Tio tre stimulis min. Poste de diversaj famaj institucioj mi ricevadis stipendiojn por multaj majstriĝaj kursoj. Mi iris al internaciaj konkursoj, fariĝis ilia laŭreato. Tiel la ŝtupoj de mia vojo supreniris ĝis la jaro 2000.



A. Pereira, foto de S. Schwiertz

Kaj kio okazis en la 2000?

Nomeda Kazlaus: En majstriĝa kurso de 2000 mi konatiĝis kun *Montserrat Caballé*. Kaj jen jam dum dek jaroj ni estas kune. Kaj tiam ŝi dum kelkaj semajnoj provadis ĉe junaj kantistoj malkovri, estas tia bela termino, la arkitekturon de sonado. Montserrat

rakontis pri kvalito de sono, klarigis per kiuj rimedoj oni eligu bonkvalitan operan sonon, kiel estingi ĝin. Do, post nia inerkonatiĝo mi akiris multe da kontraktoj. Vi verŝajne scias, ke por tio la plenumontoj devas partopreni en provaŭskultadoj ktp. De mi oni tion ne postulis. Estis mirakla kaj distinga komenco, kiu difinis mian vivovojon, la nivelon de mia komunikiĝo kun gekolegoj kaj plenumantoj.

La muzika mondo Vin konas ne kiel Nomeda Kazlauskaitė, sed kiel Nomeda Kazlaus. Klarigu tion.

Nomeda Kazlaus: Kiam mi konatiĝis kun **Montserrat Caballé**, ŝi prezentis min al sia frato, al unu el la plej bonaj agentoj de XX jarcento Carlos Montserrat. Ili planis



multajn koncertojn kaj nian partoprenon en ili. Ĝuste tiam li telefonis al mi kaj diris: “Komprenu, Via familinomo estas tiom komplika por aŭskultantoj. Al vi, litovoj, ĝi estas bela, sed kiel Vi opinias, se ni kurtigus ĝin? Okazis granda diskutado, estis pritraktitaj multaj variantoj. Mi diris, ke estus plej ĝuste havi almenaŭ duonon de mia vera familinomo. Tiel ni akceptis jenan decidon – Kazlaus.

Jam kelkfoje en nia interparolo sonis la nomo Montserrat Caballé. Pri ŝi ni tiom multe legis, sed tamen, kion ŝi signifas en Via vivo, kia homo ŝi estas por Vi?

Nomeda Kazlaus: Por mi persone? Estas unu el la plej signifaj homoj en mia vivo. Apud miaj gepatroj, patrinjo kaj paĉjo kaj aliaj proksimuloj.

Ili estas en la unua loko. Sed Montserrat ... Vi scias, kiam vi renkontas Homon aperas iu ligo kaj parenceso spontane. Tio, kion vi komprenas ekde la unua rigardo, la unua renkonto. Tiam, kiam ŝi ekaŭdis min, ŝi tuj senpere, dum la majstriĝa kurso, in-

vitis min kanti kune kaj tiel komenciĝis jam nia dekjaron daŭra komunikiĝo. Dum tiuj ĉi jaroj multo okazis kaj en mia kaj en ŝia vivo. Kaj nun en Vilno okazis senlima festo por denove kunkanti, havi precipan, solenan programon, por komunikiĝi kaj diri unu al la alia multe da gravaj vortoj kaj bondeziroj, por diskuti.

En unu el Viaj intervjuoj Vi estas dirinta, ke Caballé ne havas lernantojn. Kaj Vi estas kiel – amikino, kunkantanto? Kaj eble tamen lernantino? Ja alie tio signifus, ke Vi de ŝi nenion ellernis?

Nomeda Kazlaus: Dirante, ke Caballé ne havas lernantojn mi atentis nur tion, ke ŝi neniam havis tempon por instrui tiel kutimas en Litovio – opera solisto kromlaboras ankaŭ en Muzika kaj Teatra Akademio. Cetere ankaŭ min jam kelkfoje oni invitis por instrui tie. Sed mi nun ne havas tempon por tio. Ankaŭ ŝi ne havis. Ŝia ĉefa lernantino estas ŝia filino Montserrat Marti, kiun oni nomas rekte Monsita. Vere, unufoje dum la jaro Caballé gvidas majstriĝan kurson. Mi havas distingvan statuson, ĉar mi tutan tempon estas kiel ŝia familiano. Kun Caballé mi tre facile komunikiĝas. Sur scenejo, ĉiuj tion vidas, ni estas proksimaj partneroj.



Ĉu estas malfacile vivi kiel kantisto? Tiu ja devas domaĝi sian voĉon, ne povas uzi ŝvitbanejon. Kaj kiel pri sporto?

Nomeda Kazlaus: Vere, la atento por la voĉo kaj sano necesas precipa. Sed mi havas tian opinion, ke la vivo devas trapasi nature. Kaj ju pli nature kaj pli simple vi traktas

la medion kaj cirkonstancojn, des pli bone via korpo kaj animo servas vian voĉon kaj defendas kontraŭ neatenditaĵoj. Mi jam antaŭlonge en Litovio komencis kompari operan kantadon kun profesia sporto. Cetere, mi estas granda adoranto de korbopilko, same kiel multaj litovoj. Dum mia laborado en Eŭropo mi ekŝatis piedpilkon, same belartan sketadon. Imagu, Pluŝĉenko (sketisto) foriras nur por triminuta sketado kaj liaj taskoj estas la samaj kiel niaj. Ni foriras antaŭ publiko kaj kantas kvinminutan Karmen-arion kaj devas demonstri ĉion dum tiuj kvin minutoj. Estas grandega respondeco, koncentriĝo kaj grandega disciplino. Por tio oni pretiĝas dum jaroj! Komparante operan kantadon kun sporto mi atentigas laboron kun si mem. Do, tiu, kiu laboras kun si mem, perfektigas la korpon, animon kaj, same kiel en arta sketado, kreas belartan efekton.



Nomeda Kazlauskaitė –Kazlaus kun Montserrat Caballé maje de 2010 koncertis en Vilna Nacia teatro de Opero kaj Baleto. Sonis verkoj de Giuseppe Verdi, Giacomo Puccini, Wolfgang Amadeus Mozart, Imre Kalman, Georges Bizet

Kiujn perspektivojn havas litovoj pri penetrado sur la mondan scenejon? Ĉu en Litovio ekzistas cirkonstancoj, kiuj stimulus niajn talentulojn? Ja tiaj talentuloj kiel Sabonis (korbopilko) kaj Nomeda aperas nur unufoje dum centjaro.

Nomeda Kazlaus: Dankon pro tiuj vortoj, sed mi opinias, ke litovoj estas ja talenta popolo. Tia estas la genetiko. Litovoj estas sonorvoĉa popolo, ni antaŭe precipe ofte kantis la popolajn kaj aliajn kantojn. Sed ne sufiĉas nur voĉo. Necesas ankaŭ interna kaj profesia sinpreparo. En Litovio eblas akiri bonegan kantobazon, sed por evoluigi

la talenton necesas multo. Litovio estas tro fermita kaj malgranda lando por ke ĝi povu disponigi al talenta junulo ĉion tion kio necesas por sinrealiĝo. Nepras partopreno en internaciaj konkursoj, necesas homoj, kiuj pretigu por tio, necesas majstriĝaj kursoj, estas bezonata sperto de aliaj landoj. Nu, kaj unue, ni ellernu subteni kaj efektive apreci unu la aliajn.

Litova Stelo: Porfine la demando, kiun ricevas ĉiu gasto de nia revuo – ĉu Vi havis la okazon renkontiĝi kun Esperanto, kun esperantistoj, kiun opinion Vi havas pri ĉi tiu inernacia lingvo?

Nomeda Kazlaus: Pri Esperanto mi ekaŭdis dum la lernado en *Ĉiurlionis*-noma lernejo. Ankaŭ esperantiston mi renkontis – ĝuste min akompananta pianisto estas studinta ĉi tiun lingvon. Mi opinias, ke la ideo de Esperanto estas tre bela, ĉar ĝi unuigas homojn. Same kiel la klasika muziko. Tial la deziro doni al la mondo unu kompreneblan lingvon estas speciale proksima por ŝatantoj de klasika muziko.

ĴURNALISTA KONKURSO DE „LITOVA STELO“

La Klubo de Ĵurnalistoj Esperantistoj ĉe la Asocio de Litovaj Ĵurnalistoj (LŽS), la Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio kaj la revuo de Litova Esperanto-Asocio “Litova Stelo”


anoncas

konkurson por aŭtoroj de “Litova Stelo”.

La celo de la konkurso estas stimuli verdakadon en Esperanto pri litovaj temoj, instigi

la aŭtorojn al pli profunda prezento de la temoj, al pli alloga rakontado, al pli riĉa esprimivo de la aŭtora lingvo. La konkursantoj licas uzi konsultan aŭ redaktan helpon de pli spertaj esperantistoj.

La konkurson partoprenas aŭtoroj de ĉiuj literaturaj kontribuajoj (ne malpli ol unupaĝaj) aperigitaj en “Litova Stelo” ekde n-ro 1 de 2010 ĝis n-ro 2 de 2011.



Gajnintoj de la unuaj tri lokoj estos diplomitaj kaj ricevos premiojn – **200, 150 kaj 100 Ld.** respektive.

JUBILEAS BRAVA MUZIKISTO EDVARDAS PIŠČIKAS



Kiam el la presejo foriros LS n-ro 4, des pli post kiam vi ricevos ĉi tiun numeron, la impresa gvidanto de la internacie populara muzika grupo “Asorti” Edvardas PIŠČIKAS /*Piščikas* estos jam festinta sian **50**-jariĝon.

Estas tia jubileo por kiu eblas prezenti gratulojn dum la tuta jaro. Do, kara Edvardas, akceptu bondezirojn de la redaktoro kaj de la legantoj (multaj el ili ja konas Vin, aŭ almenaŭ estas aŭdintaj pri Vi): ĝoju mem kaj sukcese ĝojigu aliajn!

Edvardas Piščikas naskiĝis la 16-an de aŭgusto 1960 en la vilaĝo *Užventis* (distrikto *Kelmė*, okcidenta Litovio). Lernis li en urbo *Šiauliai*, tie koncertis kaj eĉ elprovis pentroarton (en 1979). Muzikanto li estis ĉiam – jam 14-jara li ludis en profesia bando kaj gajnis monon. Dum la jaroj 1979-1981 Edvardo militservis en Kazahio.

En 1981 E. Piščikas venis al urbeto *Visaginas*, tiam *Sniečkus*, konstruita por laborantoj ligitaj kun Ignalina atoma centralo (ties la unua reaktoro ekfunkciis fine de 1983). Ĝis la jaro 1983 li laboris kiel pentristo (!) de tiama *Sniečkus*, poste ĝis 1993 kiel arbaristo kaj samtempe kiel soninĝeniero, estro de muzika studio *Asorti* en la urba Junulara domo de verkado (ankaŭ nun).

La muzika trupo ASORTI kreiĝis en 1982, komence kiel muzikanta duopo: estis Edvardo kaj veninta el la latva *Daugavpils* Jelena. Ilija amiko, kiu kunludis, proponis la muzikan ensembleton titoligi “ASORTI” (ja estis plenumata buntstila muziko – france *assorti* signifas taŭge komponita). Baldaŭ Edvardas kaj Jelena (amikforme – Lena) geedziĝis kaj fine de 1984 enmondigis talentan fileton Edgaras, kiu nun estas la tria, brila ano de la familia trupo ASORTI. Pri la supera muzikisto Edgaras indus rakonti al niaj legantoj iam aparte.

Kiam kaj kiel la geedzoj Piščikas kaj ilia filo fariĝis esperantistoj? Ili tre aspiris kun sia muzikado elorbitiĝi al la internacia skalo. Henrik Peniuta, la gvidanto de ĵus fondiĝinta (en 1989) urba E-klubo “Espero” konvinkis ilin eklerni por tio la internacian lingvon Esperanto kaj partopreni belartan konkurson “Muzo” en Vilno. Estis la jaro 1992, kiam la triopo “Asorti” koncertis antaŭ vasta E-publiko kaj estis tuj rim-




arkita. Pasis nur ankoraŭ kelkaj jaroj kaj ĝi ekgastrolis ankaŭ eksterlande. Multaj landoj, inter ili, Finnlando kaj Germanio (kelkfoje!), Pollando, Svedio, Belgio, Nederlando, Italio, Japanio estas en la listo de gastigantoj. Memkomprene, en la programo de Asorti ĉiam eniras ankaŭ E-eroj. Laste, finjulie de 2010 la geedzoj Lena kaj Edvardas (vidu ilin

sur la foto en la supra dekstra angulo) duope koncertis antaŭ finna neesperantista publiko. Tie la unuan fojon estis plenumita kanto laŭ la vortoj de M. Bronŝtejn “Melankolia aĝo” (lin vidu sur la suba foto). Cetere, la plena trupo “Asorti” planas somere de 2011 koncerti en Italio.

Ekde kiam en 1991 en Visaginas komenciĝis tradicia internacia muzika festivalo “Visagino Country”, “Asorti” kiel unu el gastigantoj ofte plenumas eksterkonkursan programon.

Edvardas Piŝĉikas, kiel esperantisto, sen kia ajn dubo, restas centra figuro en Visaginas. Ekde 1993 li estas senŝanĝa gvidanto de la urba klubo “Espero”. Li senĉese kaj aktive laboras sur E-kampo. Tial dank` al li Esperanto en la urbo akiris bonan, seriozan renomon.

Multaj partoprenatoj de ĉi-jaraj Baltiaj Esperanto tagoj en Visaginas havis la okazon persone kontakti kun modesta, kompleza kaj talenta homo Edvardas Piŝĉikas. Ni ĉiuj deziru bonfarcon al li!




V. Ŝilas; la fotoj de V. Ŝilas, el albumo de *Asorti* kaj de Joanna Filipovicz- Choroszuca

150-JARA JUBILEO DE ELSTARA ESPERANTISTO DAMBRAUSKAS-DOMBROVSKI

Ne nur la unua litova esperantisto, sed ankaŭ la unua en la mondo katoliko esperantisto **Aleksandras DAMBRAUSKAS** / *Dambraŭskas* aŭ Adomas JAKŠTAS (literatura pseŭdonimo) naskiĝis la 8-an de septembro 1860 en la vilaĝo *Kuronys* (distrikto *Kėdainiai*, la centra regiono de nuntempa Litovio), en familio de reĝklasaj vilaĝanoj. En la vilaĝo loĝis kelkaj Dambrauskas familioj. La najbaroj distingis ilin laŭ kromnomoj. Por la gepatroj de Aleksandras “algluiĝis” la kromnomo Jakŝtas – tiuj ja loĝis apud rivereto *Jakštupis* (*Jakŝta* rivero). Tial A. Dambrauskas siajn litovlingvajn artikolojn komencis subskribadi kiel *Adomas Jakŝtas*. Mortis A. Dambrauskas la 19-an de februaro 1938 en Kaŭno (litove – *Kaunas*); li estas enterigita apud Kaŭna Katedralo, sur kies ekstera muro estas alfiksita surtomba tabulo. Estis li la unua pastro esperantisto, filozofo, socia aganto, poeto, literatura kritikisto, profesoro, prelato.

Dumstude en Peterburga katolika eklezia akademio. La poŝtkarto el fontoj de Nacia Mažvydas-noma biblioteko



Studijū Peterburgo katalikų dvasinėj akademijoj laikais

Unu el la plej elstaraj esperantistoj ĉe la sojlo de XIX-XX jarcentoj, grava aganto de litova liberiĝa movado (kontraŭ poligo, rusigo kaj germanigo), katolika aktivulo, matematikisto, poeto, filozofo, literatura kritikisto, akademiano – tiel kurte ni devus prezenti la elstarulon **Aleksandras DAMBRAUSKAS**. Cetere, en E-medio li estas konata kiel Aleksandro DOMBROVSKI.

La kapabla juna Aleksandro nur dum duonjaro lernis en popola lernejo. Post memstara prepariĝo li en 1872 trapasis eniran ekzamenon kaj estis akceptita lerni en gimnazio de urbo *Šiauliai*. Dum la gimnaziaj jaroj A. Dambrauskas legadis beletran kaj sciencan literaturon, bone konatiĝis kun rusa kaj pola literaturo. Liaj plej ŝatataj objektoj tiam estis poezio, filozofio, matematiko, historio, la greka kaj la franca lingvoj.

En 1880 li dum unu jaro studis en Matematika-naturscienca fakultato de Peterburga universitato. Ĉi tie li aŭskultis prelegojn de la fama filozofo V. Solovjov, kiu forte influis postan verkadon de A. Dambrauskas mem. Dum la jaroj 1881-1884 li studis en Kaŭna Pastra Seminario kaj en 1884 li kun episkopa stipendio daŭrigis la studadon en Peterburga supera Eklezia Akademio. Kiel studento-kleriko li, post la ricevo de la unua Esperanto-lernolibro, ankoraŭ en 1887 ekstudis ĝin kaj tuj skribis al Zamenhof la unuan poŝtkarton en korekta (!) Esperanto. La Eklezian Akademion A. Dambrauskas finis en

1888, magistriĝis pri teologio kaj estis konsekrita pastro. Samjare li iĝis kapelano en gimnazio de urbo *Panevėžys*. Pro la partopreno en litova naciliberiĝa movado li en 1889 estis ekzilita por 5 jaroj al Ustjužna (Novgoroda gubernio) kaj revenis de tie en 1894. Komence en 1895 li posteniĝis kiel kapelano en Kaŭna malliberejo, sed poste li estis devigita ŝanĝi kelkajn laborlokojn. Nur en 1898 li posteniĝis kiel profesoro pri eklezia juro en Kaŭna Pastra Seminario. En 1902 li profesoris pri historio de eklezio kaj aliaj disciplinoj en Peterburga Eklezia Akademio. En 1906 li revenis al Kaŭno kaj ĝis la morto loĝis en la sama loĝejo (*Rotušės* placo 23), krom la jaroj 1914-1915, kiam li, kiel persono danĝera al la rusa reĝimo, estis translokigita al Vilno – Kaŭno ja estis garnizona urbo).

Reveninta al Kaŭno A. Dambrauskas fondis St. Kazimiran societon por eldono de litovlingvaj libroj, gvidis ĝin, redaktis kristanajn revuojn. En 1911 li kunfondis junularan kristanan organizaĵon *Ateitis* (estonto). En gazetaro A. Dambrauskas komencis kunlabori en 1884. Li publikigis artikolojn pri teologiaj, filozofiaj, literaturaj, artokritikaj kaj matematikaj temoj, pri logiko. A. Dambrauskas tutan vivon interesiĝis pri matematiko. Li havas certajn meritojn pro ellaboro de litovaj matematikaj terminoj. En 1914 A. Dambrauskas estis promociigita al prelateco. En 1919 li kune kun aliaj fondis Litovan E-asociacion, en 1922 Litovan katolikan sciencan akademion kaj estiĝis ĝia prezidanto.

“Litova Stelo” plie prezentas al siaj legantoj ĉi subajn artikolojn de **Bernard GOLDEN** kaj de **Manuel CASANOVES** pri A. Dambrauskas.

PASTRO ALEKSANDRO DOMBROVSKI

Alfabeto malpermesita

Dombrovski ne povis publikigi sian verkon ie ajn en la rusa imperio, ĉar la cara dekreto de la jaro 1864 malpermesis al litovoj presadon de libroj kaj gazetoj per la latina alfabeto. Por eviti tiun obstaklon, litovoj presigis siajn eldonaĵojn eksterlande, kaj kaŝe venigis ilin en sian hejmlandon je risko de malliberigo aŭ ekzilo en Siberion. Ankaŭ Dombrovski sekvis la saman vojon, kaj lia libro *Mokintuve Terptautiszkos kalbos* aperis en la orientprusia urbo Tilzito (nuntempe *Sovetsk*, Rusio - LS) en 1890. En julio 1891, Zamenhof informis al Dombrovski, ke li ankoraŭ ne ricevis ekzempleron de la litova lernolibro, kaj li intencas sciigi en *La Esperantisto*, ke aĉetontoj turnu sin rekte al la eldonisto, J. Schönke, en Tilzito. Kvin jarojn poste, en januaro 1896, Zamenhof skribis, ke li volonte akceptos por vendado 15 ekzemplerojn de la lernolibro, sed li avertis Dombrovski, ke la vendado longe daŭros, ĉar pro la malpermeso kontraŭ litovaj libroj, la libro devas figuri en la «Nomaro» kiel «ne rice-



vebla». La ŝajne nesupereblaj baroj kontraŭ ĝia distribuado daŭris ankaŭ dek du jarojn post la eldono, ja en januaro 1902 Zamenhof demandis al Dombrovski, «Ĉu oni povos ie ricevi vian litovan lernolibron de Esperanto? Ĉu vi ne povus sendi al mi almenaŭ unu ekzempleron?». Dek du tagojn poste li povis konfirmi ricevon de la longe atendata libro. Kiam la dua eldono aperis en 1908, ĝi povis esti libere vendata, ĉar jam en 1904, post 40 jaroj, la cara malpermeso estis nuligita. La litova lernolibro de Dombrovski estis listigita sub noto 47 en la «Nomaro de la verkoj» en Esperanto. Ĝi konsistas el du partoj: en la unua estas la gramatiko kaj tradukaĵoj de «Patro Nia», pecoj el la Biblio, proverboj, leteroj, litovaj popolkantoj, kaj aliaj versaĵoj; la dua parto estas dudirekta Esperanta kaj litova vortaro.

Religia verkaro

En januaro 1896 Zamenhof petis Dombrovski traduki ion por la «Biblioteko de Esperanto» - «se la tempo al vi permesas». Tri jarojn pli frue Dombrovski sendis al Zamenhof versaĵon, eble pri religia temo, por eventuala aperigo en *La Esperantisto*. En sia respondo, Zamenhof skribis, ke li ne scias, ĉu ĝi aperos, ĉar s-ro Trompeter, la mecenato, kiu finance apogis la gazeton, «estas granda malamiko de ĉiuj religiaj kaj politikaj demandoj». Religiaj versaĵoj de Dombrovski estis publikigitaj en *Preĝareto por Katolikoj* de Louis de Beaufront, eldonita en 1893 en Reims, Francio. Tiu verko enhavas la versaĵon «*Estu Estu!*», kiun Dombrovski dediĉis al Papo Leono la 13-a okaze de lia 50-jara episkopeca jubileo.

Ankoraŭ unu verko de Dombrovski inkludita en la *Preĝareto* estas la kanto kun la vortoj «*Laŭdadu Dion, ĉiuj gentoj teraj...*». En 1902 Dombrovski publikigis en Peterburgo kanton, dediĉitan al la Societo «*Espero*» por ĝia dekjara jubileo; ĝi estis fondita en Peterburgo en 1892. J. Naujalis komponis la muzikon, kaj Zamenhof kontrolis la lingvan ĝustecon de la teksto. En *Fundamenta Krestomatio*, kies unua eldono datiĝas de 1903, troviĝas tri versaĵoj de Dombrovski: du litovaj popolkantoj, «*Mia Mizero*» kaj «*La Malliberulo*», kaj unu originala poemo, «*Nova Kanto*».

En 1905 estis eldonita Versaĵareto, kolektaĵo da religi-etosaj poemoj verkitaj de Dombrovski. «Himno - kanto esperantista» kun poezio de Dombrovski kaj muziko de sino José Guivy, estis publikigita de Presa Esperantista Societo en Parizo en 1907. En Kaunas (Kovno) en 1914-1915 aperis *La reĝo judea*, kvarakta dramo de K. R. (kriptonimo de Konstantin Romanov), tradukita de N. Devjatnin kaj redaktita de Dombrovski. La dua eldono aperis en 1923. Dombrovski kontribuis originalajn verkojn kaj tradukaĵojn al jenaj gravaj periodaĵoj: *L'Espérantiste* (Parizo), *Lingvo Internacia* (Upsalo), *La Revuo* (Parizo), kaj *Literaturo* (Londono). De 1922 ĝis 1926 li redaktis en Kaunas *Litova Stelo*, la organon de la Litova Esperanto-Asocio. La sama organizaĵo publikigis samloke en 1923 *Litova Almanako*, enhavantan literaturon kaj artikolojn pri la litova kulturo fare de Dombrovski kaj aliaj litovaj esperantistoj.

Sciencaj studoj

Dombrovski dediĉis sin ankaŭ al sciencaj studoj kaj publikigis du verkojn pri matematiko: *Pri unu speco de kurbaj linioj*, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton kaj *Pri novaj trigonometriaĵoj* (Berlino, 1906). Tria scienca verko estas la broŝu-

ro *Esperanto kiel scienca helpilo*, raporto legita al la Kovna Esperantista Societo (Kovno, 1910). Estas nature, ke pastro interesiĝas pri filozofiaj demandoj, kaj tio estas atestebla ĉe Dombrovski per lia libro *Malgrandaj Pensoj pri Grandaj Demandoj*: artikolaro kaj leteraro (Kovno, 1908). Dombrovski tuŝis teologiajn demandojn en diskuto kun Zamenhof sur la paĝoj de *Ruslanda Esperantisto* en 1906. En la januara kaj februara numeroj Zamenhof aperigis anonime artikolojn temantajn pri lia neŭtrala religia filozofio nomata unue hilelismo, poste homaranismo. Kiam A.I. Asnes, la redaktoro, informis Zamenhof, ke pastro Dombrovski sendis longan artikolon kritikantan laŭ katolika vidpunkto la filozofian sistemon proponitan de Zamenhof, tiu ĉi konsilis al la redaktoro aperigi la atakon. Uzante la pseŭdonimon Homarano, Zamenhof rebatis en la maja numero de la revuo *Ruslanda Esperantisto*, substrekante, ke la kritikado fare de Dombrovski estis kaŭzita de simpla malkompreniĝo. Verŝajne tiel finiĝis la polemiketo, ĉar pluaj interŝanĝoj de opinioj pri tiu temo ne okazis.

Lingvo kaj movado

Pastro Dombrovski okupiĝis ankaŭ pri lingvaj kaj movadaj aferoj. En aprilo 1893 aperis en *La Esperantisto* lia letero pri nova planlingvo proponita de unu el la pioniroj de la naturalisma skolo, la aŭstriano Julius Lott, en ties gazeto *Le Kosmopolit*. Ankaŭ Zamenhof sciis pri la agado de Lott sur la internacilingva tereno, kaj li komentis pri ĝi en siaj propraj verkoj. Kiam Zamenhof en la sekva jaro voĉdonigis la abonantojn de *La Esperantisto* pri reformoj, Dombrovski estis inter tiuj, kiuj apogis la punkton 1: «restigi la lingvon Esperanto senŝanĝe en ĝia ĝisnuna formo». En 1905 la litova pastro estis elektita al la Lingva Komitato.

Post la unua mondmilito, Dombrovski partoprenis en la fondo de la tutlanda Litova Esperanto-Asocio en 1919, kaj li ankaŭ funkciis kiel la direktoro de *Internacio Katolika* (IKA) por Litovio.

Dum kvindek jaroj li korespondis kun eminentuloj en la Esperanto-movado pri la lingvo, religio kaj scienco. Dombrovski havis okazon viziti Zamenhof nur unu fojon. En 1912, survoje al la Tria internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Budapeŝto, li haltis en Varsovio kaj gastis ĉe la aŭtoro de Esperanto, kiu, onidire, regalis sian vizitanton per taso da teo kaj kelkaj litovaj esprimoj en sia konversacio.

Antaŭ la nomo de Dombrovski staris ne nur la mallongigo P-ro (Pastro), sed ankaŭ Prof., ĉar li plenumis la oficon de profesoro en la Peterburga Pastra Akademio. La kompilado de kompleta bibliografio de la verkoj de Dombrovski estus tre malfacila tasko. Inter la dek lingvoj, kiujn li sciis, li verkis en kvin: la litova, rusa, pola, latina kaj Esperanto. Litovlingva artikolo pri liaj rilatoj kun Zamenhof estis esperantigita kaj publikigita en *La Estingigintaj Lumiloj* (1930) kun la titolo «L. Zamenhof en Litovio», kaj en 1937 aperis lia mallonga rememoraĵo pri Zamenhof en *Ora Libro de la Esperanto-Movado*. [...] Li mortis la sekvan jaron, la 19-an de februaro 1938.

La «peko» de la pioniroj

La biografio de Aleksandro Dombrovski, kiel prezentita tie ĉi, estas bazita sur donitaĵoj registritaj en haveblaj konsultlibroj. Multaj aspektoj de la vivo de la unua katolika esperantisto mankas, tutsimple ĉar nek Dombrovski mem, nek liaj samtempuloj

postlasis pli detalajn informojn. Se Dombrovski estus surpaperiginta ĉion, kion li sciis pri Zamenhof, eble hodiaŭ oni povus respondi la demandon: ĝis kiu grado Zamenhof sciis la litovan lingvon? Sed nun ne havas sencon demandi, kial Dombrovski ne verkis plenan priskribon de siaj travivaĵoj en la frua Esperanto-movado. Ankaŭ aliaj pioniroj same pekis. Nun movad-historiistoj povas rekonstrui la tutan bildon, pene kunmetante hazarde nepereintajn donitaĵojn, kvazaŭ pecojn de granda puzzleo.

Eĉ surbaze de la skiza biografio de Dombrovski, estas eble iom taksu lian vivon kaj verkaron. Ŝajnas, ke la litova lernolibro estas lia ĉefa Esperanta verko, sed, en la unuaj jaroj post publikigo, ĝi havis restriktan utilon. Esperanta lernolibro, kiu ne estas akirebla en la lando, kie ĝi estas bezonata (la lernolibro estis disvastigata nelegale – *LS*), ne povas efiki favore sur la disvastigon de Esperanto tie. Pluraj litovoj, kiuj volis lerni Esperanton tiutempe, certe faris tion helpe de lerniloj en la rusa aŭ pola lingvo. La tradukoj, kiujn Dombrovski faris de litovaj beletraĵoj, plej verŝajne aperis nur en periodaĵoj aŭ verkoj de aliaj aŭtoroj, kaj ne libroforme. Kiel redaktoro de la ĵurnalo *Draugija* kaj prezidanto de katolika libro-eldona societo (1907), Dombrovski certe verkis pli en la litova lingvo ol en ĉiuj aliaj, kiujn li konis.

Pensinstiga demando por spekulativo estas jena: se Dombrovski vivus nuntempe, kiun rolon li elektus por si en la movado?

Bernard Golden (1925-2008),

arkeologo, aŭtoro de 1800 beletraĵoj, artikoloj kaj recenzoj en Esperanto, membro de la Akademio de Esperanto, estrarano de Centro por Esploro kaj dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo

ANKORAŬ PRI PASTRO DOMBROVSKI

Kun granda plezuro mi tralegis la bone dokumentitajn artikolojn pri la pastro Aleksandro Dombrovski, kiujn verkis la multflanka kompetentulo s-ro Bernard Golden (Espero Katolika - EK 2, 3, 4-5/1983, paĝoj 32-33, 46-47, 73-74).

Mi esperas, ke li indulgeme pardonos min, se ankaŭ mi kontribuos per kelkaj kromaj detaloj al la biografio de nia pioniro, pri kiu, cetere, Golden mem konfesas, ke «nekompletaj estas la biografiaj donitaĵoj» (EK 2/1983, p. 32) kaj «multaj aspektoj de la vivo de la unua katolika esperantisto mankas» (EK 4-5/1983, p. 74).

Esperantlingva kapableco

Aleksandro Dombrovski, la aŭtoro de la unua Esperanto-lernolibro por litovoj (1890), membro de Esperanta Lingva Komitato (fondita en Boulogne la 8an de aŭgusto 1905) prizorgis ankaŭ dokumenton pri sia kapableco en Esperanto. En *Internacia Korespondado Esperanta* - kolekto da adresoj, proponoj kaj petoj (kiu estis vendebla ĉe Presa Esperantista Societo en Parizo), troviĝas listo de tiuj, kiuj estis ricevintaj la Ateston pri kapableco (ekzameno starigita de «Societo franca por la propagando de Esperanto»). Elstaraj katolikaj pastroj troveblaj en tiu listo estas:

« n-ro 69. Abato Peltier, Cheillé Francujo... en majo 1903 (p. 70),

147. **Abato Dombrovski**, Sankta-Peterburgo... en aŭgusto-septembro 1903 (p. 71),

Sciencaj studoj

Tuj post forpaso de A. Dombrovski en *Litova Stelo* (n-ro 2 (20), marto-aprilo 1938, p. 2-3) aperis grava artikolo de A. Poška *Profesoro Aleksandro Dambrauskas-Dombrovski – litova pioniro de Esperanto*. En la sama numero de *Litova Stelo* (p. 8-9) troviĝas artikolo subskribita de *Loko* pri A. *Dambrauskas kiel matematikisto*. Tie oni legas, interalie: «Li jam en la komenco de tiu ĉi jarcento interrilatis kun la francaj profesoroj-matematikistoj kaj aperigis en franca revuo la konkludon de sia unua matematika verko *Koncerne la V-an Eŭklidan postulaton. Dijon 1902*. Post tri jaroj, en 1905, aperis jam plena verko, pliampleksigita kaj korektita, sub la nomo *Pri unu speco de kurbaj linioj koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton*. Sekvontjare aperis nova verko, kiel titola paĝo estas jena: *Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Originale verkis Prof. A. Dombrovski. 1906. Germanujo. Esperanto Verlag Möller kaj Barel. Berlin S. 42*. Ĝin tuj tradukis franclingven prof. E. Lefevre.

Pri matematikaj demandoj A. Dambrauskas korespondadis kun multaj scienculoj. Ni povas ĉi tie noti jenajn: D-ro Cyrill Vorös, prof. E. Lefevre, S. Moharović, C. Bourlet, Cb. Méray kaj J. Boudier. Li korespondadis esperantlingve.

Religia verkaro

Lia poemo «Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj», inkludita en la *Preĝareto por katolikoj* de Louis de Beaufront, kiel Golden ĝuste diras, estas tiu sama kanto pri kiu mi skribis antaŭ kelkaj jaroj: *Datrevenoj... Unua diservo kun E-lingvaj kantoj: Smolensk (Rusujo), 1896.10.26* (EK 1/ 1977, p. 12). Fakte ni nur citis la vortojn de Dombrovski en letero al la fondinto de EK, pastro Peltier (12.5.1902). Nova preĝejo katolika estis konstruita en Smolensk, kaj «tieaj katolikoj volis... fari tiun ĉi feston plej eble solenan. Ĉe tiu okazo Smolenskaj esperantistoj ekdeziris ankaŭ ekmontri siajn religiajn sentojn. Tial, preninte el la Beaufront'a «Preĝareto» mian poezion «Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj», verkigis muzikon por ĝi kaj en la dirita solena tago trakantis ĝin ĥore dum la Meso. Oni min sciigis *post factum* pri tio ĉi».

Alia kanto de Dombrovski, kiun oni efektive kantis, estas supozeble tiu sama «*Himno-kanto esperantista*», kiun Golden mencias, kun poezio de Dombrovski kaj muziko de s-ino José Guivvy, kaj publikigita en 1907 de Presa Esperantista Societo en Parizo. Mi ne scias, ĉu ĝi estas ankaŭ unu el tiuj poemoj de Dombrovski jam aperintaj en la kolektaĵo *Versaĵareto* en 1905. La fakto estas, ke dum la diservo okaze de la I-a UK de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 6.8.1905), oni kantis, interalie la himnon «El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj Ni kunvenintaj Vin adoras, Di'», kiun Dombrovski verkis por la okazo. La 5-strofan tekston mi legis en la *Parva Anthologia* fine de la latinlingva lernolibro de Jakobo Bianchini *Cursus completus Esperanti...* (1934), p. 115: «Himno dediĉita al la Esperantista kongresanaro, kantita dum la meso de la unua Esperantista Kongreso de Boulogne-sur-Mer». S-ro Alfons Sabadell (1859-1932), kiu dum multaj jaroj estis la sola persono, kiu posedis la voĉon de Zamenhof en malnovaj vaksaj cilindroj, jam en 1905 partoprenis tiun unuan kongreson kiel delegito de la katalunaj esperantistoj. Li verkis pri ĝi sep artikolojn (!) en la grava katalunlingva gazeto *Joventut*, kaj en la dua artikolo (n-ro 290 - 31.8.1905, - p. 563-564), li diras, ke dum la solena diservo okazinta dimanĉon la 6-an de aŭgusto, (mi elkatalunigas) «oni kantis diversajn komponaĵojn en Esperanto, inter

ili belan himnon verse verkitan de pastro Dombrovski el Peterburgo, kun muziko de s-ino Guivy el Tours ...Por ke la legantoj mem juĝu la belecon de la strofoj de la himno, jen mi citas kelkajn»(sekvis la 1-a kaj 5-a strofoj).

Lia morto

Litova Stelo, en sia n-ro 2 (20) de marto-aprilo 1938 informis ke la ŝtatestro «Antanas Smetona - la unua kaj la nuna Prezidento de Litovujo» aperas antaŭ la korpo senviva de pastro Dombrovski (mortinta la 19-an defebruaro): «Litova ŝtatprezidento A. Smetona (maldekstre) adiaŭas la mortinton».

La novaĵo pri la forpaso de Dombrovski aperis en EK n-ro 157, majo 1938, p. 58: «A. Dombrovski † Lumigilo de Litovujo. La 19-an de februaro en Kaunas, la nuntempa ĉefurbo de Litovujo, por eterne ekdormis nia pioniro, la senlaca paca batalanto - prof. prelato Aleksandras Dambrauskas - Adomas Jakštas...».

Dum la unua laborkunsido de la 30-a UK en Londono, la 1-an de aŭgusto 1938, ĉiuj «starante aŭskultis nomojn de la mortintaj samideanoj, inter ili nomon de mortinta litova Esperanto-pioniro prelato Aleksandro Dombrovski» (*Litova Stelo* n-ro 5, septembro-oktobro 1938, p. 1). La 6-an de majo 1998, sur la domo en kies la dua etaĝo A. Dambrovski loĝis inter 1906-1938 kaj sub ties gvido funkciis Societo de St. Kazimiro estis inaŭgurita bareljefa memortabulo.

Dombrovski, preskaŭ-fondinto de IKUE

Raportante pri la 5-a UK de Esperanto, okazinta en Barcelono en septembro 1909, la ĉefredaktoro de EK, s-ro Claudius Colas, skribas (EK, n-ro 58, septembro-oktobro 1909, p. 1):

«Dekfoje, dum tiu neforgesebla semajno, la katolikoj kunvenis... Ni laboris. Ni organizis ne nur vorte, sed efektive, la tutmondan societeton de katolikoj esperantistaj, al kiu ni donis la nomon «Katolika Unuiĝo Esperantista», kaj kies regularon oni legos en tiuj paĝoj...».

Poste, sur paĝoj 4-8, oni legas la gravan kaj longan leteron de Dombrovski al la katolikaj kongresanoj, post tiuj ĉi enkondukaj vortoj: «Kun profunda emocio estis aŭskultita de ĉiuj katolikaj kongresanoj la jena altsenta kaj belega letero de Patro Dombrovski, dum la kunsido okazinta en la «Joventut Católica» la 7-an de septembro. Oni ne povus esprimi pli elokvente kaj pli belstile la sentojn, kiuj devas esti en la koroj de ni ĉiuj Esperantistoj katolikaj, kaj inspiri ĉiujn niajn agojn». Kaj tuj sekvas la letero, kies komencaj vortoj estas:

«Estimataj geanoj en Esperanto kaj karaj gefratoj en Kristo,

Ne povante el la malproksima Litovujo veni Barcelonon kaj partopreni persone en la solenaj kongresaj festoj, mi petas vin, honorindaj kongresanoj, doni al mi kelkajn minutojn por vin alparoli letere kaj esprimi miajn sentojn, je kiuj okaze de kongreso estas plena mia koro...».

Nu, preskaŭ je la fino de la longa letero, aperas lia epokfara propono krei organizaĵon tutmondan de katolikaj esperantistoj:

«Ĉu ĝi nomiĝos «Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo», ĉu alie, tio ĉi estas ne grave... Kia ĝi devas esti por plej bone respondi al la nuntempaj bezonoj de la katoli-

karo - mi ĝin nune difini ne povas. Mi nur sentas ĝian senprokrastan bezonon kaj estus vere feliĉa, se vi, estimataj kongresanoj, ĝin pripensu, priparolu kaj fondu».

Fakte, tiu estis ja la intenco de la kunvenintoj (almenaŭ de pastro A. Richardson, kiu prezidis la Katolikan Komitaton, kaj de tiuj, kiuj jam konis la venintan leteron de Dombrovski). Unuflanke, post la senlacaj tiudirektaj klopodoj jam faritaj de pastro Peltier, la demando pri unuiĝo de la katolikaj esperantistoj estis unu el la punktoj antaŭviditaj jam antaŭ la kongreso en Barcelono (EK, n. 52, 1909, p. 188-190): «8-e. La Societoj Esperantistaj. Ĉu ni devas *unuiĝi* la tri ekzistantajn societojn?» (Ŝajnas, ke temas pri «Societo Katolika Internacia», «Pastra Esperantista Frataro» kaj «La Abeloo Esperantista»). Aliflanke, jam dum la kongreso, la 7-an de septembro 1909, «S-ro Richardson, prezidanto, malfermis la kunsidon... kaj sciigis, ke la celo de la kunveno estas: konigi la regularon de la fondata tutmonda katolika asocio. Antaŭ ol pastro P.Llirò, kiu skribis la regularon, konigis ĝin al ĉeestantoj, s-ro Colas legis belegan kaj elokventan leteron senditan de famekonata Pastro Dombrovski, el Kovno (Rusuĵo), al Katolikoj de la Kvina Kongreso. Per tiu letero li plendis, ke li ne povas ĉeesti la kongreson, kaj poste li montris per gravaj kaj logikaj argumentoj la neceson de unuiĝo de katolikoj; li varmege petis, ke oni bonvolu pripensi tion senpartie, kaj ke oni sin decidu fari la deziritan unuiĝon. Li estas tiel certa, ke lia deziro efektiviĝos en la katolika urbo Barcelono, ke li tutkore aliĝas al decidoj de la samreligianaj kongresanoj... S-ro Colas rimarkigis, ke la programo de la fondota asocio sin tute trovis en la ĵus de li legita letero, kaj proponas, ke oni donu al ĝi la nomon «Katolika Unuiĝo Esperantista» ĉar en la vorto «Unuiĝo» troviĝas la tuta senco de la asocio, kaj de nia idealo. Jes, katolikoj bezonas forton, kaj unuiĝo estas forto! Poste P. Llirò, fervora kataluna esperantisto, legis la regularon. Ĝi estis akceptita unuvoĉe.

Pastro Richardson estis elektita ĝenerala Prezidanto de la ĵus fondita K.U.E. (*Raporto pri la agado de la katolikoj dum la V-a Kongreso*, aperinta en EK (n-ro 59, novembro 1909, p. 36-42) kaj poste ankaŭ en la *oficiala dokumentaro pri la Kvina Universala Kongreso de Esperanto* (Esperantista Centra Oficejo, Parizo, 1910, p. 104-108).

En la sama novembra numero de EK (p. 48-49) aperis la *Regularo de «Katolika Unuiĝo Esperantista»* (K.U.E.), kies 1-a artikolo tekstas jene: «Fondiĝas Universala Societo de tutmondaj katolikoj Esperantistaj kun la nomo “Katolika Unuiĝo Esperantista” (K.U.E.)». Post la 10-a kaj lasta artikolo sekvas noto, kiu sciigas, ke ĉi tiu regularo estis adoptita de la Katolika Kongresanaro en Barcelono. Nun oni prezentas ĝin al la aprobo de la naciaj sekcioj de KUE, kiuj rajtas sendi rimarkojn aŭ kritikojn al la redaktoro de EK. La definitivan formon de tiu regularo oni fiksos «dum la Unua internacia Kongreso de KUE», kiu devos okazi kaj efektive okazis - en Parizo en 1910, laŭ decido de la Barcelona Kongreso.

Fine mi esperas, ke kvankam tre modeste, mi iel kontribuis al la biografio de Dombrovski kaj ankaŭ al la historio de la unuaj paŝoj de nia amata IKUE.

Pastro Manuel CASANOVES i Casals (1927-2010), cmf.

*Komitatano, Dumviva Membro de IKUE,
Prezidanto de «Kataluna E-Asocio»,
la unua hispana membro de Amnestio Internacia*

PRI ORIGINO DE LITOVAJ FAMILINOMOJ

La polaspekta, iom litovigita, familinomo de **Aleksandras Dambrauskas** (komence ĝi figuris kiel Dombrowski, aŭ Dąbrowski) ne devus vin mirigi. Ekde fino de XVII jarcento, precipe en la XVIII disvastiĝis “pli prestiĝaj” slavigitaj familinomoj de litovoj. Tial en la komenco de XX jarcento nur apenaŭ 20 % da litovoj (plej ofte de malalta origino) konservis pure litovajn familinomojn. La slavigan procezon akcelis ankaŭ tio, ke slaviginte sian familinomon (ekzemple, tradukinte ĝin al la pola lingvo, aŭ nur almetintaj slavan sufikson -eviĉ, -ovski) ekhavis pli multe da okazoj strebi al klerco aŭ fari almenaŭ iun karieron.

Kiu estas aŭtentika origino de familinomo de vera litovo A. Dambrauskas? Multaj opinias, ke ĝi devenas el la pola vorto *dąb*, prononce - *demb* (litove – *ažuolas*, konforme esperante – kverko). Povas esti, ke iu lia praaŭo estis nomata *Ažuolas* (ekzistas homoj kun tiu familinomo!), kiu pli poste “sinjoriĝis”. Tamen, laŭ mia opinio, la familinomo devenas el la vorto *dambra* (la arkforma muzika instrumento, konata en Litovio jam en XV jarcento), aŭ el la vorto *dambryti* (treniri). Tiam la prapatro de Dambrauskas povis esti aŭ *dambroludanto*, aŭ forĝisto produktanta “dambrojn”, aŭ simple flegma homo.

Vytautas Šilas

* + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + * + *

Forpasis Viktoras BANIULAITIS

La 14-an de junio 2010 en *Klaipėda* post longa malsano en la 93-a vivojaro forpasis malnova aktiva esperantisto, inĝeniero Viktoras BANIULAITIS. Li naskiĝis 04.08.1917 en Ukrainio, sed 5-jara jam loĝis en Litovio. Pri Esperanto li ekinteresiĝis jam antaŭ la dua mondmilito, sed la lingvon eklernis en 1966, en *Klaipėda* kaj tuj aliĝis al tiutempa Esperanto-rondeto. En 1968 kune kun aliaj aktivuloj li kunfondis modelan E-klubon en *Klaipėda*. Dum multaj jaroj li estis sekretario de la klubo, dum kelkaj - prezidanto. V. BANIULAITIS estis kunorganizanto de someraj E-tendaretoj en *Giruliai* apud *Klaipėda*. Li ne



nur partoprenadis BET-ojn (Baltiajn Esperanto-Tendarojn), sed estis ĉeforganizanto de kelkaj el ili. Li ankaŭ gvidis E-kursojn – kiujn dum 1970-1973 finis pli ol 150 personoj. Li ĉiam havis multajn eksterlandajn kontaktojn, peris E-periodaĵojn. V. BANIULAITIS estis arda kolektanto de esperantaĵoj kaj havis valoran kolekton de insignoj. Lastjare pro malboniĝinta sanstato li jam ne povis partopreni E-agadon. Pri li zorgis lia duonfilo, iam tre aktiva esperantisto Algis Vizgirdas. Laŭ la volo de la forpasinto la tradicia funebra entombiga ceremonio ne okazis - li estis kremaciita. Litovaj esperantistoj memoros s-non Viktoras kiel simplan kaj mildan homon, forte konvinkitan esperantiston. Ni kondolencas liajn familianojn, parencojn kaj proksimulojn.

Povilas JEGOROVAS, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

DANKON AL „GARIŪNAI“ !



Ŝajnas, ke esperantistoj de tiuj landoj, kie ilin subtenas la ŝtato ne havas problemojn pri sia ekzistado (kunvenejoj, kursejoj ktp.). Tute alie estas en la landoj, kie regas merkataj rilatoj. Ankaŭ Litovio apartenas al tiu landa kategorio. Tial tre gravas al ni akiri por nia agado financan subtenon de entreprenistaj institucioj. Litova esperantista ĵurnalista asocio (LEĴA) tre ĝojas ricevi subtenon de unu el gravaj entreprenoj de bazarurbo *GARIŪNAI*. Estas akcia kompanio “POSŪKIS” zorganta pri ekspluatado de la bazarego. Ĝi jam trian jaron subtenas la seminariojn de LEĴA. La ĉiujara financado sufiĉas por pripagi luadon de somerumejoj kaj ties servoj. Ni jam skribis (en *LS* n-ro 3) pri la ĉi-jara ĵurnalista seminario en la urbeto *Aukštadvaris*. Ĝi ne estus ebla sen la subteno de “Posūkis”. Sinceran dankon al ĝi kaj ĝia gvidanto Arūnas DIRVINSKAS!

La bazarurbo “Gariūnai” funkcias jam dudekan jaron. Gratulon al ĝi okaze de la jubileo! Grandskalaj entreprenaj kompanioj ĉiel penis fermi la bazarurbon, sed tiu, tamen, eltenis. Tre gravas, ke la enterprenoj de la bazarurbo “Gariūnai” ne limas sin nur pri komercado. Ili aktive partoprenas en socia kaj kultura vivo de Litovio. Estu tiel longdaŭre!

Litovaj esperantistoj ĵurnalistoj

Foto de Virginija Valuckienė

ETERNE PROGRESANTA

**aŭ la homo,
kiu iam perdis
la verdan steleton**

La 1-an de julio 2010 kunlaboruloj de Instituto pri Matematiko kaj Informatiko en trankvila etoso konstatis, ke ilia kolego inĝeniero-programisto de la Grupo pri Komputila Lingvistiko **Antanas GRINCEVIČIUS** silente trapaŝis gravan duonvojon de sia vivo kaj atingis la riĉrikoltan aŭtunon.

Ni trarigardu kiamaniere supreniris la ŝtuparon de sia vivo tiu modesta, silenta, mistera eĉ moketema homo – fidela edzo, zorgema patro de 2 filinoj, vartema avo, programisto kaj esperantisto.



Antanas Grincevičius en Kaŭno, 2010

Antanas Grincevičius, ĝis 1995 Antanas Krencevičius (poste estis restarigita la vera familinomo) **naskiĝis la 30-an de junio 1950** en la vilaĝo *Lendrikės* (distrikto *Raseiniai*). En 1968 li finis mezlernejon de *Pakražantis* (distrikto *Kelmė*) kaj en 1973 – matematikajn studojn en Vilna Universitato. Li kiel programisto laboris en Informadika Centro de Ministerio pri Konstruado (1973-1982), en Sciencesplora Instituto pri Elektroveldaj Instalaĵoj (1982-1992), en Sciencesplora Instituto de Komputiloj (1992-1993) kaj en Litova Nacia Opera kaj Baleta Teatro (1993-1998). Ekde 1999 A. Grincevičius laboras en Instituto de Matematiko kaj Informadiko.

Kun Esperanto A. Grincevičius unuafoje renkontiĝis ankoraŭ dum studentaj jaroj, en la kurso gvidita de studentino de pli alta kurso Regina Maŝalaitė (nun Grzębowska, kunlaborantino de La Internacia Centro Pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz). Tamen jam post unu jaro Esperanto estis forgesita, la verda steleto perdita, tamen la ĝermo ne pereis.

Post longaj jaroj (en 1987) li denove finis E-kurson por komencantoj ĉe Vincas Grigaitis. Kiel „perdita filo“ Antanas studas Esperanton ĝis nun. Dum 1991–1994 li kompostis „Litovan Stelon“, dum erao de Petras Čeliaskas estis ĝia redakcia konsiliano (1996–2005) kaj prizorgis la rubrikon „Mozaiko de Litovia vivo“. De 1991 ĝis nun li verkas artikolojn por „Litova Stelo“, tradukas diversajn tekstojn (en LS n-ro 5 legu beletraĵon, tradukitan de li). Li konstante verkas artikolojn por esperantlingva

Vikipedio. Ĉar Antanas estas serioza unuopa mastro por si mem kaj ne serĉas okazon (fakte malŝatas) paroli sur bazara barelo, tial li la 10-an de oktobro 2008 lanĉis esperantlingvan gazeton „Barelo“ (<http://barelo.blogspot.com>). Mi kredas, ke ĉi tiu barelo ne likos kaj oni povas fidi al ĝia senfundeco.

Kvankam la jubileulo ne estas librotenisto de sia vivo, mi kalkulis, ke en la revuo „Monato“ dum 1993–2004 estas publikitaj ĉirkaŭ 44 artikoloj kaj en la franca revuo „La Gazeto“ publikiĝis lia recenzo pri la libro de J. Borges „La sekreta miraklo“.

Antanas ne estas indiferenta pri sano kaj korekteco de Esperanto kaj iam ne timas esti „herezulo“ (legu LS 99/5, 12; 01/3, 22; 03/4, 6). Ĉiam lin interesas bona, eleganta stilo de Esperanto.

La vivo de Antanas fluas silente. En juneco li rompita rilatojn kun Esperanto, en la saĝa aĝo li ekŝatis ĝin serioze (la amo – forta kiel morto). La kvietaj akvo de lia vivo lavas bordojn de nia Esperantujo.

Fini mi povus per la vortoj de apostolo Johano: „sed mi esperas vidi vin baldaŭ, kaj ni parolos vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Paco al vi. Salutas vin la amikoj“ (3 Joh., 14). Sed la jubileŭlo ne rapidas renkontiĝi kun Sankta Johano – ankoraŭ multon li volus plenumi dum la tera vivo. Estu do tiel! Plej bonajn sukcesojn!

Meĉislovas Gripekėdis

ANKAŬ ĴURNALISTOJ BIERUMAS



La 7-8an de aŭgusto en la Turisma Somerumejo de s-ino A. Graužinienė okazis ne ordinara somera bieruma kurso por Konsilianoj de Litova Ĵurnalista Asocio. La kursanoj havis kelkhoran ekskurson al la ĉefa litova bierfarejo „Švyturys“ en apuda la urbo **Utena**. Tie ili konatiĝis kun teknologio de bierfarado, gustumis diversajn specojn de produktata biero (multaj el tiuj estis plej alte taksitaj dum eŭropaj bierkonkursoj. En la somerumejo la partoprenantoj ĝissate frandis bieron, aŭskultis prelegon de konata etnologo Gražina **Kadžytė** pri litovaj banejoj kaj bierumaj tradicioj, ĝuis ŝvitbanejon kaj freŝigan akvon de *Alaušo*-lago.

La prezidanto de la Gildo de Litovaj Bierfarantoj Saulius **Galdauskas** enmanigis al la kursanoj, inter ili al kvar membroj de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio (LEĴA) diplomojn de Litova Biera Akademio. La porĵurnalista bieruma kurso okazis laŭ la kontrakto inter Litova Ĵurnalista Asocio kaj la Gildo.

Informo de LEĴA

MUZO-10 TAMEN OKAZIS

La anoncita belarta konkurso MUZO-10 pro ekmalsano de la unu-sola organizantino Jūratė **Bartaškienė** (kiu devis kolekti konkursaĵojn ktp.) estis endanĝerigita. Ĝi eniris la programon de BET-46 en Visaginas kaj malgraŭ ĉio sukcesis okazi !!!

La konata literaturisto Mikaelo Bronštejn resumis tiel:

MUZO – MODESTA, SED EFIKA



Poezia kaj deklama konkurso "Muzo" pasis ĉi-foje tre modeste. Tamen la ĉeestantoj plezure aŭskultis la enkondukan parolon de la konkurso-vidanto Vytautas Šilas, kiu rakontis pri la historio kaj la problemoj de „Muzo“. Poste deklame sin prezentis kvin konkursantoj. Venis ankaŭ unu eksterkonkursanta prezentaĵo.

Tri venkintojn difinis la publika voĉdonado. Tiel **Nora Caragea**, **Vavere Emilija** kaj **Lukoševičienė Plamira** (de dekstre) ricevis diplomojn de BET.

“Espereble, tiu ĉi modesta konkurso efike influos la tradicion por plia progreso”, - finis M. Bronštejn.

Partoprenantoj de BET-46 proponis ke la konkurso “Muzo” okazu en BET-oj ĉiujare. Zorgi pri okazigo de sekva, MUZO-11, devontiĝis gvidantoj de la muzika trupo “ASORTI”.

La konkurso MUZO-11 okazu en jenaj branĉoj:

1. **PROZO** originala (noveloj)
2. **POEZIO** originala (ne pli ol du versaĵoj de unu aŭtoro)
3. **DEKLAMADO** – recitado de poeziaĵo laŭ propra elekto
4. **KANTADO** sole aŭ grupe (po unu kanton)

Anoncitaj kaj honorigitaj estos gajnintoj de unuaj tri lokoj en apartaj konkursoj. Konkursaĵoj pri originalaj prozo kaj poezio devas esti anonimaj (subskribitaj kaŝnome). La konkursaĵoj devas esti senditaj ĝis la 1-a de junio 2011. Recitontoj kaj kantontoj devas anonci sin plej malfrue la unuan tagon de BET.

Por kontaktoj:

Edvardas PIŠČIKAS, Draugystės 1-28, Visaginas, LT-31208 Litovio;
e-poŝto: asorti3@gmail.com; tel.: +3706 657 89676 (Jelena PIŠČIKIENĖ)



ESPERANTO – MOZAIKO

☆ **Diplomon pri Elstara Arta Agado** unue aljuĝis la Estraro de UEA. Sep elstaraj E-agantoj estis diplomitaj en la ferma ceremonio de la 95-a UK en Havano: aktorino **Georgina Almanza** (Kubo), aktorino **Vida Jerman** (Kroatio), ĥorestrino **Franjo Lévêque** (Francio), aktoro **Saša Pilipović** (Serbio), verkisto **Trevor Steele** (Aŭstralio) kaj verkistino **Spomenka Štimec** (Kroatio).

☆ **Rezultoj de belartaj konkursoj:**

PROZO

Unua premio: **Edmund Grimley**

Evans (Britio) pro *En katedralo* ;

Dua premio: **Sten Johanson** (Svedio)
pro *Verda ondado* ;

Tria premio: **Luiza Carol** (Israelo)
pro *La deturniĝo* ;

Honora mencio: **Paulo Sergio Viana**
(Brazilo) pro *Rulseĝo*.

Partoprenis 50 verkoj de 30 aŭtoroj el 14 landoj.

ESEO

Unua premio: **Christian Rivière**
(Francio) pro *Vortfarado kaj Radikfarado* ;

Dua premio: **Doron Modan** (Israelo)
pro *L'espero, l'obstino kaj la pacienco* ;

Tria premio: **Paulo Sergio Viana**
(Brazilo) pro *La literatura vivo de Esperanto*.

Partoprenis 9 verkoj de 8 aŭtoroj el 6 landoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA
n-roj 391, 392

☆ **Kompakta disko kun 19 litovaj kantoj** estas plue akirebla en oficejoj de Litova E-Asocio en Kaŭno, en Vilno, ankaŭ en libroservo de UEA (Roterdamo). La kantojn plenumis popularaj kantistoj Romualdas **Vešiota** kaj Augustas **Kubilius**. La disko aperis en la kvanto de 1000 ekzempleroj.

☆ En 2010 **kunlabore kun la Litova E-Asocio** la eldonejo *Sezonoj* eldonis du 32-paĝajn kolektojn sub la titoloj *Dek libroj* kaj *Dek gazetoj*. Temas pri prezentoj de eldonaĵoj, kiuj grave influis la evoluon de Esperanto lingve, socie kaj kulture. La libretoj estas aĉeteblaj ĉe la libro-servo de UEA kontraŭ 4,50 eŭroj. Litoviaj, Pollandaj kaj Ruslandaj esperantistoj povas aĉeti ĝin rabatite rekte ĉe Sezonoj en Kaliningrado, aŭ ĉe ĝiaj reprezentantoj en Kaŭno, Vilno, Olsztyn kaj Moskvo.

⌘ KORESPONDA KESTO ⌘

..... esperantisto deziras korespondi kunpri ...

La adreso estas:

VALENCIA



Skribante korespond-peton bv. indiki vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj preferojn.

Kune kun via korespond-peto ne forgesu sendi al litovastelo@takas.lt ankaŭ vian foton, kiun ni publikigos kune kun via anonco!

RIDETU KUNE!

☺ PRI BANKO

- Kio estas banko?
- Estas la loko, kie per via mono oni faras sian monon.



☺ SENPAGE

- Mi revas viziti Parizon. Kiom tio kostus?
- Nenion! Ĉar revii oni povas senpage!

☺ EL ĈASISTA SPERTO - KUNPRENU

- kuglojn – la pafilo sen ili pafas nur sur scenejo;
- netrapafeblan torsujon – ne forgesu, ke vi ja ne sola ĉasas;
- medikamentan keston – iam eĉ netrapafebla tursujo ne savas;
- asekuru la vivon – tio helpas travivi al via familio en tiu okazo, se ankaŭ la medikamenta kesto ne savos vin.

☺ BONEGA MONUMENTO

Sur katedrala placo en Vilno staras monumento por fondinto de la ĉefurbo Vilno, la grandduko Gediminas. Tiu staras antaŭ sia rajdĉevalo. Ĉe la monumento kolektiĝis grupo da vilaĝanoj, suvalkanoj (litovaj gabrovanoj). Aliras ilin ĵurnalisto kaj demandas:

– Kiel al vi plaĉas la monumento?

La suvalkanoj sincere:

– Bonega monumento! Ni, ĝenerale, tre ŝatas ĉevalojn!

☺ ONI DIRAS, KE SE ...

- nigra kato antaŭ via aŭto feliĉe trakuris la ŝoseon, ĝi tre sukcesis;
- vi ferios kune kun via edzino al vi ambaŭ ne estos interese aŭskulti impresojn pri via feriado;
 - la loĝejaj fenestroj ne plu tralastas la sunan lumon, sed la muroj kelkloke jam radias – tiam, finfine, venis la tempo por komenci loĝejan riparon;
 - venintaj al Litovio eksterlandaj turistoj, ekvidinte afiŝojn de vendejgo “Maxima XXX”, pensas ke temas pri grandega porno-centro.

PERANTOJ *de* LITOVA STELO

BELGIO: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 ANTWERPEN
 BELORUSIO: Eŭgenija Pečkova, Nadeždinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK
 BRAZILIO: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR 70084 – 970 BRASILIA, DF
 BRITIO: Viv O` Dunne, Stacion Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST 12 9DE
 ĈEĤIO: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 PODĚBRADY II
 DANIO: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK-2100 KØBENHAVN Ø
 ESTONIO: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 KURESAARE
 FRANCO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS
 GERMANIO: EsperantoLand e. V. Berlin, s-ro Lu Wunsch-Rolshoven,
 Wiciefstrasse 9, DE-10551 BERLIN
 HISPANIO: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 SABADELL
 ITALIO: Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875
 IRLANDO: Rūta Vaičiūnaitė, DUBLINO, ruta64@centras.lt; tel. +353 8762 78929
 LATVIO: Margarita Želve, Rūpniecibas 35-13, RĪGA LV-1045
 MAKEDONIO: Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP
 NEDERLANDO: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM
 POLLANDO: Robert Kaminski - ul. Kwiatowa 1 m 3, PL-94-227 LODZ, lodzano@nestrada.pl
 RUSIO: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD
 SVEDIO: Lisbet Andreasson, Kajska Kavats gata 8, SE-242 –35 HÖRBY
 UKRAINIO: Mikaelo Lineckij, av. Heroj Stalingrada 42-v-64, UA-04213, KIEV;
ml@esper.kiev.ua
 USONO: E.L.N.A., Esperanto-USA, 1335, Stanford Ave Suite 300, Emeryville Ca 94608

PERANTOJ EN ALIAJ LANDOJ ESTAS SERĈATAJ!

La revuon Litova Stelo vi povas aboni ĉe la perantoj, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la administracio de Litova E-Asocio (LEA, ab. d. 167, LT-44002 Kaunas-C; litova.ea@mail.lt).

Se vi ĝiros la pagon rekte al nia konto *litv-s* ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando, vi pri tio mem nepre informu la administracion de LEA (ne la redaktoron) kaj sendu al ĝi via(j)n adreso(j)n.

ATENTU LA ABONPREZOJN ! Ili ne altiĝis !!

Por Litovio: jarabono 20 Lt; unuopa n-ro 4 Lt;

malnova jarkolekto 10 Lt.

Por landoj de eksa Sovetio: jarabono 7 €;

unuopa n-ro 1,50 €; malnova jarkolekto 4 €.

Por eksaj socialismaj landoj: jarabono 10 €; unuopa n-ro 2 €;
malnova jarkolekto 5 €.

Por ceteraj landoj: jarabono 14 €; aerpoŝta aldono 6 €;
unuopa n-ro 3 €; malnova jarkolekto 7 €.

Pro falanta kurzo de USD ni indikas abonprezojn nur en EUROj.

La abonado senlimdata! - ĉiu aboninto ricevos ses numerojn de la jaro!

Lietuvos žvaigždė ISSN 1648-4185 Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas

2010 m. Nr.4. Baigta redaguoti 2010.08.12.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. 10-...

Spaustuvė "MORKŪNAS ir Ko", Draugystės g. 17, LT-51229 Kaunas-31.